




## Zagreba metodo

Partoprenantoj de la lasta junia E-pikniko eble memoras, ke s-ro Karlo Offutt promesis montri dum la julia kunsido de la E-societo instruan E-filmon “Gerda malaperis”. Li plenumis la promeson. Pro la fakto, ke ne ĉiuj scias, ke la filmo estis produktita laŭ la samtitola libro de C. Piron, verkita por lernantoj de E-o laŭ Zagreba metodo (ZM), enkonduka prelego estis dediĉita al tiu unika instru-stilo. Do, la ZM estas maniero instrui IL-on kaj enhavas 500 la plej uzatajn morfemojn laŭ studoj de Zlatko Tišljär. La ZM estis inventita en kroata ĉefurbo, kiam oni realigis multajn kursojn al diversaĝaj personoj, per diversaj metodoj kaj lernolibroj, sed la rezultoj, aparte ĉe la infanoj en lernejoj, estis nekontentigaj. Pedagogia teamo en Internacia Kultura Servo en sepdekaj jaroj de la 20a jarcento konstatis ke kulpas la lerniloj, kiuj ne bazas sin sur la strukturo de Esperanto mem, sed imitas lernolibrojn de aliaj naciaj lingvoj. Z. Tišljär faris esploron pri ofteco de uzataj radikoj en parolata Esperanto (en UK Lucerno 1979 li surbendigis parolatan materialon de esperantistoj en ĉiutagaj konversacioj – 60.000 vortojn – kiun li komputile prilaboris) kaj ricevis la liston kun entute 1500 morfemoj el kiuj laŭ ofteco unuaj 467 kovris 95% de la tuta korpuso. En IKS oni elektis teamon (Zlatko Tišljär, Spomenka Ŝtimec, Roger Imbert kaj Ivica Ŝpoljarec) kiuj kune disdividis la taskon fari lernolibron atentante ke ĝi ne estu granda (maksimume 12 lecionoj) kaj ke en ĝi enestu nur la 500 morfemoj de la menciita esploro.

La unua lernolibro aperis eksperimente en 1980 kaj estis dissendita al 350 instruistoj en la mondo kun peto pri iliaj rimarkoj. La kroata versio de la lernolibro estis ŝanĝata baze de la rimarkoj en siaj unuaj 4 eldonoj ĝis la jaro 1985. Stile la lecionojn plibonigis en la 4a eldono Tibor Sekelj. La postaj eldonoj ne plu estis ŝanĝitaj. La libro taŭgas kaj

por memstara, kaj por koresponda, kaj por ĉeesta kursa studado. La studentoj povas esti malsamlingvanoj — je ĉi tiu kazo instruisto provizu ĉiun lernanton per la vortlistoj kaj eksplikoj de gramatikaĵoj en lingvo, parolata de ŝi aŭ li. Aperis ankaŭ B-lernolibro kaj instrukciaro por instruistoj, aldona bildstrio de C. Piron (kiu verkis ankaŭ 3 apartajn kantojn por ĝi) kaj leg-romaneto de G.F. Cooper “La sentimulo”, bazita je la 500 radikoj. Intertempe la baza lernolibro aperis en 30 adaptoj al diversaj – ĉefe eŭropaj lingvoj, sed ankaŭ kelkaj aziaj kaj afrikaj. Aŭtoro de la angla eldono – prof. John Wells. Nun oni povas lerni per ĝi ankaŭ



en elektronika formo ĉe [www.lernu.net](http://www.lernu.net) en 26 lingvoj. Instrukciaro por instruistoj, instruantaj laŭ la zagreba metodo, helpas ilin, enhavante klarigojn pri la metodo, uzeblecon, havante la skemon por 24-hora kurso, enhavante aldonajn ekzercojn, demandojn, kantojn, ekzamenmaterialojn. Helpe de tiu libreto kaj la lernolibro eblas kvalite instrui en komencaj kursoj ĉiuspecaj (kun unulingva kursanaro aŭ plurlingva, kun infanoj ekde proksimume 11-a jaraĝo ĝis maljunaj personoj) sen specialaj sinpreparoj. La Zagreba metodo ebligas al lernantoj lerni komence sen balastaj vortoj kaj gramatikeroj nur tion, kio estas nepre necesa kaj tuj praktikebla kaj tial la gelernantoj pli rapide progresas, ol uzante aliajn metodojn. Tio altigas la lerno-motivojn. Kutime jam post la lerno de la unua duono de la lernolibro la

gelernantoj povas elturniĝi lingve en ĉiuj ĉiutagaj situacioj. La baza Esperanto-scio, akirata per tiu ĉi metodo, estas tre konvena kiel instruado minimuma, sed sufiĉa kiel antaŭscio necesa por posta lernado de alia fremdlingvo – do kiel lernendaĵo necesa, kiam Esperanto servas kiel propedeŭtika rimedo.

Bedaŭrinde, direktoro de biblioteko, kie kunsidas nia societo, ne scipovis ekipi la kunsidon per necesa televid-instalaĵo, kio malebligis spekti la filmon, sed abunda informo pri la Zagreba metodo estis ricevita.

## Estimataj muzikŝatantoj!

Esperanto daŭre prosperas tra siaj tradiciaj someraj festivaloj, kun muzika kvalito kiu maturiĝas jaron post jaro, ĉiam preterpasante ignore la landlimojn kaj antaŭjuĝojn, kaj certa pri sia estonto. Por tiuj kiuj pensis ke Kore, la bando de Kris Spitzer, forgesis E-on, jen, li revenas vigle post sep jaroj da silentado. Se mankas al vi io por legi pri Vinilkosmo.com, ne estas pro manko da materialo, kaj se la diversaj aktoroj de la E-scenejo, pli kaj pli multnombraj en Myspace.com, pruvas tion monaton post alia, tamen ne forgesu mendi niajn novajn diskojn, kaj eĉ niajn plej malnovajn... la artistoj ne plendos pro tio! Kompleta katalogo ĉe: <http://www.vinilkosmo.com>

## En la universitato de okcident-ukraina urbo Ternopil

okazis scienca konferenco pri la stato kaj perspektivoj de E-o en XXI jarcento. La konferencon, kiu estis dediĉita al la 100-jara datreveno de la plej unua E-lernolibro por ukrainoj (Ternopil, 1907), partoprenis multaj doktoroj de scienco (ne nur lingvistoj, sed ankaŭ medicinistoj, biologoj, pedagogoj, fizikistoj, ekonomistoj); konklude estis eldonita prelegokolekto de la konferenco. Interese, ke la kolekto enhavas artikolojn de tri membroj de nia E-societo: V. Pajuk verkis 2, d-ro L. Kordylewski kaj M. Jones – po unu. Okaze de la konferenco estis emisiitaj 3 p/markoj, unu el kiuj enhavas portreton de M. Jurkiv – verkinto de ukraina E-lernolibro.

## Reeĥo

Admiras vian kaj ĉiujn tieajn gesamideanojn pro bonega laboro cele antaŭenirigi la movadon en tiu parto de Usono. Anĝelina, La Verda Domo de Arizono.

Kara Esperantisoj ĉe Ŝikago, dankon denove pro "Saluton". Kia ĝuanta foto kaj novaĵo pri la pikniko! Kaj Gratulon pro la geedzigxo kaj domo kun ĝardeno. Pro la poemo ankaŭ – dankon. Amike, Beth Magallón



### Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktor' Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
[www.esperanto-chicago.org/](http://www.esperanto-chicago.org/)

### Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;  
Familia membro : \$30, Regula: \$20  
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,  
Charles Gunn, 828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607

### KUNVENOJ

**okazas kutime la kvaran mardon  
de ĉiu monato  
en:**

**Sulzer Public Library, 4455 N.  
Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.**  
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda  
Konferenca Salono, unua etaĝo.

## Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

28an de Aŭgusto – Roberto kaj Sepideh rakontos pri la lasta UK en Jokohamo

28an de (atenton: vendredo!) Septembro – Tina Seastrom transdonos etoson de E-kurso en San-Diego kaj d-ino Novak raportos pri sia vagado tra Pollando

23an de Oktobro – pri sia patro – astronomo kaj E-isto, prelegos d-ro Kordylewski

